


La Esperanto-Gironde Informilo



APRILIO 2019

N° 158

# Ĉu vi poeziumas?



# ESPERANTO-GIRONDE KUNVENO EN PESSAC LA 3an DE FEBRUARO 2019 je la 10a30

**C**eestis: Jean-Seb Brilleaud, Annie Brilleaud, Elvezio Canonica, Karima Choukairi, Janine Dumoulin, Yannick Dumoulin, Gloria Garagallo, Klodin' Pomirol, Marcelo Redoulez, Bernard Vidal.

Senkulpigataj : Monique Dussenty, Martine Edelbloude, Christiane kaj Michel Jagueneau, Peio Labbé, Joël Lajus, Lucienne Laroche, Bernard kaj Rose Sarlandie, Morine Stride.

**Elvezio** bonvenigas ĉiujn kaj dankas al Jean-Seb kaj Annie pro ilia gastigado, kaj al Janine pro la lasta numero de LEGLI.

## 1. Ŝanĝo de banko

Nun, ĉio estas finfarita. La agentejo de Crédit Agricole situas en La Bastide.

## 2. Lingvo-festo

La dato ne estas publikigita ĝis nun. Verŝajne ĝi okazos post marto. Martine bonvolos partopreni en ĝi (ne la unuan semajnon de marto).

## 3. La «klačo-kafejo» en Pessac

Ĝi okazos la 12an de februaro, je la 18a30, en la halo de la kinejo Jean Eustache, en Pessac. La temo estos lingvoj. Elvezio ĉeestos kun Jean-Seb, ĉirkaŭ tablo pri Esperanto.



## 4. Clément en Roterdamo

Li ĉeestos la Semajnon de Esperanto en Tuluzo (de la 13a ĝis la 18a de marto). Li prelegos pri sia sperto. Li proponas malnovajn revuojn (Esperanto-revuo kaj Kontakto) por la universitato. Li vojaĝis al Prago kun la estraro de TEJO kaj preparas la venontan IJK-on.

Li proponis interŝanĝi kun la studentoj de la universitato per Skajpo. Sed la salono kun Skajp-alirebleco estas tre malfacile akirebla.

## 5. Diversaj aferoj

**Elvezio** sendis al Aurora kaj Gloria la ligilon por radioelsendo kun Miguel Fernandez (ĉe hispana retradiostacio «Radio Utopia»), kiu daŭras unu horon kaj duono.

**Klodin'** legas mesaĝon de Martine, kiu informas, ke Bruno ne plu estos ano de Espéranto-Gironde, pro personaj kialoj. Martine bonvolas transpreni la taskon preni la paperajn ekzemplerojn ĉe la presisto kaj ilin sendi. La ĉeestantoj de la cenoj lundoj helpas ŝin enkovertigi ilin.

**Marcelo** legas mesaĝon de FaMo, kiu informas, ke Flo retvendis KD-ojn de Brel, kaj tiuj vendoj aperigas 70€-profiton (tantiemoj). Kun aprobo de Pjer kaj Bernardo L., li proponis, ke tiu sumo estu donita al Esperanto-Gironde. Tiu propono estas aprobata de la ĉeestantoj.

La Kompanoj kantas la 15an de marto en Tuluzo, kaj tio estos la lasta koncerto pri Brel. FaMo proponas fini la ciklon en Bordojo, post la tuluza festo (la 16an aŭ la 17an), kontraŭ nur repago de la vojaĝkostoj kaj nokta loĝado (por 3 paroj). Do necesas plej rapide trovi lokon, kaj materialon: «3 (eblas elturniĝi kun 2) surpiedaj mikrofonoj por voĉoj, 1 sekura surpieda mikrofono por la banĝo/gitaro (laŭ la ejo, kaj la gitaron ankaŭ eblas rekte konekti), la akordionon ankaŭ eblas konekti per du jack 6,35 mono (ne utilas en etaj ejoj), la suzafono plej ofte ne bezonas amplifikadon».



Ni cerbumas pri iu loko: ne facilas trovi liberan salonon je tiu dato. Cetere, estas malfacile trovi eblecon gastigi la 3 parojn. La materialon ni ne havas, kaj ne scias, kiel trovi.

Do ni malĝoje konkludas, ke tiu okazaĵo ne eblas, pro tro malfrua informo. Marcelo informos FaMo-n.

**Bernard** trovis retan aliron al bildaro Pinterest, kie iu Frederico Salmi kreis elŝuteblajn bildojn pri Esperanto. Por ĝin atingi, necesas aliĝi al Pinterest.

**Marcelo** informas pri botanika staĝo en Creuse, organizata de Isabelle Jacob de vendredo la 14a ĝis dimanĉo la 16a de junio. Estas antaŭvidita staĝo pri birdoj en 2020.

**Marcelo** proponas labori pri la verkado de scenaro de Sciencfikcia Filmado : Intergalaksia interkompreno:

Jaro: 2492. Esperanto finfine sukcesis! Ĉiuj teranoj nun flue parolas esperanton denaske. Sed ĵus alteriĝas ekstergalaksia aparato, kiu alportas el ĉielo novan lernendan idiomon por la intergalaksia paco... kaj ĉio rekomenciĝas ĉar Esperantistoj defendas sian teran lingvon kiel nacioj siajn dum la dudeka jarcento!

Tagmanĝa paŭzo, dum kiu ni frandas (interalie...) bonegajn krespojn!...



Post la manĝo, ja necesas digestiga promenado. Jean-Seb kaj Annie kondukas nin al la «Bois des Sources du Peugue», tre proksima al sia domo, kie ni piediras dum kelkaj dekoj da minutoj, sur ĉarmaj padoj, inter pinarboj kaj ĉirkaŭ lago.



Post la promenado, Jean-Seb prezentas la libron *Bridge of words, Esperanto and the dream of universal language* de Esther Schor (libro verkita en la angla). Esther Schor estas 60jara profesoro pri la angla lingvo en universitato de Princeton (Usono). Ŝi estas specialisto pri brita literaturo de la romantika periodo. Ŝi jam estas aŭtoro de pluraj libroj.

Tiu libro entenas kvar ĉapitrojn; ĉiu ĉapitro enhavas du subpartojn : unu pri la historio de la lingvo, la alia pri ŝiaj propraj spertoj en la Esperanta movado.

#### I – Historio de Esperanto

1. Prahistorio: de la lingvoj artefaritaj al la Unua Libro
2. Zamenhof kaj la unua periodo: Sionismo, Hilelismo, homaranismo
3. Intermilita periodo: Lanti kaj SAT; Lidia kaj la Ba'hai; Drezno kaj komunistoj; Azio; diktaturaj persekutoj
4. Postduamilita periodo: Lapenna, Unesco, Connor, Tonkin, Löwenstein, Corsetti, Samseksemuloj, Raŭmo, interreto

#### II – Personaj spertoj (pri kongresoj kaj renkontoj)



1. NASK (nordamerika kongreso)
2. Iznik kaj Bialystok
3. Hanojo kaj Havano
4. Bona Espero

Jean-Seb tre bone klarigas kaj disvolvas la diversajn temojn.

Pri ŝiaj spertoj: dum la nordamerika kongreso Esther Schor lernis Esperanton. Poste ŝi partoprenis en diverslandaj kongresoj. Aparte interesaj estas ŝiaj sentoj, kiam ŝi partoprenis en la kongresoj de Havano kaj Hanojo: ŝi spertis esti

usonano en landoj, kiuj suferis pro usonanoj.

Poste venas la kritikoj de la samideanoj rilate la libron kaj la starpunkton de la aŭtorino:

- ŝi parolas pri judismo de Zamenhof pli ol pri la lingvo
- ŝi ne prezentas la lingvon mem, nur ekzemple.

Sed por Jean-Seb, tio estas ne bona kritiko, ĉar la informoj pri la lingvo mem facile troveblas.

Kion li trovis interesa en la libro:

- la movado havas historion, kaj ŝi prezentas ĝin kiel landon. Li sentas sin fiera aparteni al tiu komunumo.
- interesa por la publiko: la libro prezentas Esperanton kiel ion serioze studindan.
- interesa por niaj samideanoj: multaj eventoj estas nekonataj, ĉar ili ne kongruas kun la kutima propagando: ekzemple, kiam Zamenhof legis kontraŭjudajn artikolojn en pola gazeto, verkitajn de Esperantisto.

Konklude, Jean-Seb instigas nin legi la libron (kvankam ĝi estas en la angla). Li esperas, ke ĝi estos tradukita al la franca aŭ al Esperanto.

Poste, ni kunkantas en Esperanto la eŭropan himnon, laŭ la vortoj de Umberto Broccatelli, kaj Marcelo disdonas la vortojn de la *Monda himno*, de Ulrich Matthias, laŭ la sama muziko. Elvezio nin plane akompanas.

La venonta kunveno okazos la 24an de marto, en Cenon Palmer (konfirmota).

La sekva okazos en majo (loko kaj preciza dato konfirmotaj).

*Janine*



Muzikanto kaj kantantoj tre zorgaj!



**ESPERANTO-GIRONDE**  
**KUNVENO EN CENON PALMER**  
**LA 21an DE MARTO 2019**  
**de la 10a30 ĝis la 16a**

**C**eestas Rose kaj Bernardo, Elvezio kaj Karima, Ĵanseb kaj Annie, Martine, Gloria, Klodin' kaj Marcelo.

**Elvezio** malfermas la kunvenon per bonvenigaj vortoj kaj senkulpigoj de neĉeestantoj.

Li memorigas aŭ informas pri kio okazis de la lasta kunveno:

- Janine sendis la lastan numeron de LEGI.

- Martine raportas, ke kun Elvezio ŝi denove iris en la bankoficejon kaj finaranĝis la aferon: aktuale sumas 2396,03 € sur kuranta konto + 3001,87 € livret A + 42,30 € en la kaso. Elvezio, respondeculo, kaj Martine, helpantino, rajtas subskribi ĉekojn. La adreso de Martine finfine estas enorde registrita. Ŝi perrete ricevos la bankodokumentojn.

Kion fari nun per tiu mono ?

Por la **lingvofesto** en la Universitato: la dato restas daŭre ne fiksita. Ĉu fine de aprilo? Tuj sciinte, Elvezio informos nin.

Sur la budo endas prezenti manĝaĵon... originalan! Ekzemple stelforma frukto: karambolfrukto! Kial ne? Unuanimen ni entuziasmiĝas pri tiu verdastela frukto. Kie ĝin aĉeti? Rose respondas ĉe «Grand Frais». Tamen atentu! avertas Karima: karambolfrukto povas esti ankaŭ danĝera por la sano. Do nur etdoze proponi ĝin!



Kafoklaĉo en Pesako: jam dufoje deĵoris **Ĵanseb'** en la halo de la kinejo Jean Eustache. Ĵus apud la stacidomo. Partoprenantoj rajtas favore preze spekti filmon post la klaĉo. Rimarkindas, ke rekoneblas la lingvo uzota ĉirkaŭ tablo per flageto nacia aŭ verda stelo por Esperanto. Ni vidas foton. Partoprenis la lingvoj angla, franca (por eksterlandanoj), germana, itala, hispana kaj Esperanto.

*La klimatoŝanĝo*, jen la trudita debato por ĉiu tablo. Tiel okazas samtempe diverslingvaj debatoj kaj fine ĉiuj resumoj estas franclingve prezentitaj. Interesata pri Esperanto estis la respondeculo de la urbodomo pri la ĝemelaj urboj. Venu kaj partoprenu: venonta klaĉo mardon 9an de aprilo je la 18a30.

**Elvezio kaj Karima** vizitis SEMEOn en Tuluzo. Ili tie renkontis Klementon, kiu jam tre flue parolas kaj estas tre feliĉa vivi tiun sperton. Li parolis en radio Canal-Sud. Jen la reta ligilo : [https://toulouse.occeo.net/eo/esperanto-magazino-n179/?fbclid=IwAR2yYkLEp\\_GWpmTWoplwFzJDpa7ugdMApxZUMm1b5rZxN22Tuc\\_eh3I9\\_g](https://toulouse.occeo.net/eo/esperanto-magazino-n179/?fbclid=IwAR2yYkLEp_GWpmTWoplwFzJDpa7ugdMApxZUMm1b5rZxN22Tuc_eh3I9_g)

Klemento ĉe radio  
Canal-Sud



Interesa estis la vizito kun Alain de la *natura muzeo* de Tuluzo.

**Karima** parolas pri la renkonto kun Alan Neven, kroato, kaj simpatiaj junuloj el Skotlando, Katalunio, Rumanio, ktp.

**Martine** donas novaĵon pri Bruno. Li transdonis kovertostokon kaj la liston de la perpoŝtaj ricevantoj de LEGI. Ĉi lastan ni aktualigos. Bruno ankaŭ transdonis la registrilon, kiun li uzis kun Gloria por la radioelsendoj ĉe «O2radio».

**Ĵanseb'** parolas pri EDE-forumo: politika partio pri Eo. Ĝi estas subteninda forumo per simpla enlistiĝo en la dissendo listo. Demando de Bernardo: en kiuj landoj stariĝos balotaj listoj? Ŝajne en Francio kaj Germanio.

**Ĵanseb'** proponas kuntraduki en la francan la esperantan version de la Eŭropa himno (la teksto de Umberto Broccatelli : <https://lingvo.org/euhimno> ) sub formo kantebla laŭ la melodio de Ludoviko... Betoveno!

**Elvezio** rekomendas en Parizo la vizitindan muzeon: *Mundo lingvo*

Estas aludite pri libro de Robert Philipson tradukita el la angla en la francan: *La angla lingvo, danĝero por Eŭropo*.

**Karima** informas pri elsendo de France-Culture: Heinz Wismann, franc-germana filologo, filozofo, senscie traktas Esperanton. Kiel multaj li fiopinias kaj klaĉas. « *Du mythe de la tour de Babel à la conception de l'espéranto, l'humanité a toujours rêvé d'une communication universalisée. À défaut d'inventer une nouvelle langue, l'intelligence artificielle se met au service de la traduction automatique. L'IA peut-elle abattre les barrières linguistiques ?* »

Elvezio transdonas la ligilon al la elsendo *Cultures monde* de France Culture:

[https://www.franceculture.fr/emissions/cultures-monde/guerillas-linguistiques-44-de-babel-a-google-traduction-vers-un-nouveau-langage-universel#xtor=EPR-2-\[LaLettre21032019\]](https://www.franceculture.fr/emissions/cultures-monde/guerillas-linguistiques-44-de-babel-a-google-traduction-vers-un-nouveau-langage-universel#xtor=EPR-2-[LaLettre21032019])

Ek de la min. 23 oni parolas pri Esperanto, kiu, laŭvorte: « n'a pas pris car ce n'est pas une langue évolutive », « c'est une langue de service, de bas niveau », alors que « l'anglais international peut se greffer sur une vraie langue de culture » (prof. Heinz Wismann)

**Endas respondi al France-Culture eĉ se mallonge, en kiu ajn lingvo, sed amase.**

**Pri la ĝemelaj urboj:** mesaĝo el Tuluzo de Raymonde Coquisard (nun loĝanta sude de Francio). Ŝi respondecas pri *ĝemeligitaj urboj* ĉe UEA kaj UFE. Vidu artikolon en Marta reta bulteno « Esperanto-Actualités » (pli ol 4000 abonantoj). Martine notas la informon.

**Bernardo** raportas pri sia propra sperto: malfacilas konvinki urbestron enŝovi Esperanton en la oficialajn interŝanĝojn inter urboj.

**Martine** souhaite aborder le thème : ***notre site/blog Espéranto-Gironde.***

Il y a toujours affichés en page d'accueil les vœux de 2018. Comment supprimer ? Qui peut, qui sait le faire ? Janine ? Yannick ? Chacun déplore autour de la table les manques de temps et/ou compétences. Nous aurions besoin de formation.

Gloria regrette que le site ne vive pas. Morine ?

**Marcel** regrette que l'environnement en anglais n'ait pas pu être transformé pour faire vivre la version espéranto.

Demandi al Bernard Vidal, ĉu li konsentus zorgi pri nia asocia blogo, kiel li zorgas pri *La Kokcinelo*? Ĵanseb tuj permesaĝe kontaktas lin. Responde alvenas saluto de Bernardo kun lia konsento zorgi pri la blogo. Bone! Endas komuniki al li la bezonatajn kodojn.

Ĉu ni kunmarŝos **la 1an de majo**, tiel sukcese kiel lastan jaron? Gloria ŝatus. Bernardo ĉeestos. Marcelo kaj Klodin' foros tiam en Barcelono por prepari la someran SAT-kongreson. Bernard et Rose parlent de la manif de leur petit-fils.

Venonta kunveno? Jam la dato estis fiksita: la 12an de majo sed nia kutima sidejo ne estos disponebla tiam. Ni provos kontakti Monique, kiu invitis nin viziti ŝin en ŝia nova farmo. Konfirmota.

Monique DUSSENTY  
La Chèvrerie des Sources 47  
Le Bourg – Chemin de Ronde  
47180 CASTELNAU SUR GUPIE

Venas la kutima abunda bankedo... kun personaj specialaĵoj ĉiam nove spertitaj: jen supo kun lentoj kaj rafanfolietoj i.a., jen torto kun salmono kaj kukurboj, jen kuko kun rafanfolietoj kaj ursajlo, jen *Prezidanta Pico*, kaj viandaĵoj kaj vinoj kaj ĉokolada molkuko, pombakaĵo, citrona molkuko, citrona spongokuko (savojkuko). Kompreneble mi forgesis multon sed se leganto ne jam salivumas, tiu mem preparu kaj portu al ni por la venonta kunveno!





Posttagmanĝe laŭ ideo de Bernardo ni programis legadon kadre de «Printempo de l' poetoj». Lastjare jam tiu ideo plaĉis al ĉiuj dum la sammonata kunveno, tiam en Cambes. Ĉiuj do ĉirkaŭ la tablo preparis kaj volonte partoprenas en tiu malfacila tasko, partigi poezion, por emociigi aŭskultantojn. Marcelo ilustris du legaĵojn por plurvoĉa legado kaj eĉ fine kantado. *London' brulas!* ĉu aktualajo? Ne, nur aludo pri la granda incendio, kiu detruis la urbon en 1666!

Estas decidite, ke ĉiu sendu siajn elektitajn poemojn al Janine por iu speciala kolekto aperonta en estonta LEGI. Eble aparta poezia/literatura numero?

*Marcelo*



**K**lemento alvenos en Bordojo dum la lasta kurso en la universitato, t.e. **merkredon 17-an de aprilo**. Li prelegos pri sia sperto kiel voluntulo en TEJO. Poste, mi invitas vin ĉiujn pikniki en la universitata parko, kaj kunkanti kun Klemento kaj lia gitaro.

Do memoru, **merkredon 17-an de aprilo, je la 17a30 en la salono D 009.**

*Elvezio*



# PRELEGO PRI LA DU TRADUKOJ DE LA MONAĤINO-CIGANINO DE FEDERICO GARCIA LORCA EN MADRIDO (en julio 2018)

(La originalo kaj ties tradukoj aperis en la numero 157 de LEGI)

**E**n tiu-ĉi prelegeto, mi proponas interpreti kaj kompari du esperantajn tradukojn de la poemo *La monja gitana* (*La monaĥino ciganino*) de la fama hispana poeto Federico García Lorca, kiu naskiĝis en Granado en 1898 kaj mortis en 1936, murdita de la naciistaj soldatoj de generalo Francisco Franco. Tiu-ĉi poemo apartenas al verkaro *Romancero gitano* (*Cigana romancero*), eldonita en 1928. Temas sendube pri la plej populara verko de la hispana poeto. La unua esperanta traduko de la tuta verkaro estas tiu de Fernando de Diego, elstara hispana esperantisto, kaj ĝi estis eldonita en 1971 (traduko B); la duan tradukon faris Marco Antonio Botella, en sia Hispana lirika antologio (2014) (traduko A).



En la titolo mem oni trovas la nomon de iu el la plej tradiciaj fiksformaj poemoj de la tuta hispana poezio, la t.n. “romance”, romano, kiu devenas de la mezepoka tradicio. Neŝanĝebla estas ĝia strukturo: temas pri versoj de ok silaboj, kies rimoj devas plenumi du kondiĉojn: ili devas okazi en la paraj versoj, kaj devas korespondigi nur la du vokalojn de la lasta vorto, ekde la lasta vortakcento, sed ne la konsonantojn. En aliaj lingvoj, ekzemple la franca aŭ la itala, tio ne estus nomata “rimo”, sed “asonanco”; sed en la hispana, oni nomas ĝin “rima asonante”. Ekzemple: vv. 2-4-6-8: finas – pajiza – prisma – arriba ktp. La du vokaloj kiuj plenumas la rimon estas i kaj a. Laŭ la fama Parnasa gvidlibro de Kalocsay-Waringhien-Bernard, “katalunaj poetoj provis redoni tiun sistemon en nia lingvo, sed ili ne trovis imitantojn, ĉar tiaj asonancoj estas apenaŭ aŭdeblaj por oreloj ne kutimiĝintaj” (p. 31). Notinde ke la romano estas ia malfermita poemformo. Tial, oni trovas en la hispana poezio romanojn kun tre malsamaj longecoj. Pro tio, ili estas rakontaj poemformoj, per kiuj ĝenerale oni rakontas etan historion, anekdoton, aŭ epizodojn.

Ili estas tute malsamaj ol aliaj pli fermitaj fiksfarmaj poemoj, kiel la soneto, ekzemple, kiu ampleksas nur 14 versojn, kaj pro tio, kutime havas pli lirikan kaj intiman enhavon.

Do, kompreneble tiu-ĉi specifo de la romano kiel rakonta poemo havas tradicion gravecon, sed la poetoj, ĉefe en tiu-ĉi epoko, estas tute liberaj akcepti tion aŭ ne. Fakte, la periodo en kiu García Lorca verkadis siajn poemojn, estis la epoko de granda renoviĝo de la artaj movadoj, la tiel nomataj artaj avangardoj (futurismo, dadaismo, superrealismo, kubismo, ktp. ). Tamen, kiel mi esperas, ni baldaŭ vidos ke ankaŭ tiu-ĉi poemo enhavas etan rakonton.

Se ni tralegas nun la du tradukojn, ni povas ekscii tute klare almenaŭ du faktojn: ambaŭ tradukistoj respektas la strukturon de la romano: ili verkas versojn de ok silaboj kun vokalrimoj en la paraj versoj, kvankam ne temas pri la du samaj vokaloj: en la traduko A la du vokaloj estas “a” – “o” (malvoj – keirantojn - kandelabro, ktp. ); en la traduko B estas “i” kaj “o” (tigoj – lino- prismo, ktp.). La dua evidenta fakto se ni komparas ambaŭ tradukojn, koncernas la malsaman longecon: A ampleksas pli da versoj ol B (40 kontraŭ 36). Plie, oni devas konstati ke B havas ekzakte tiom da versoj, kiom la originala poemo: ĉu pli fidinda? Ni klopodos respondi tiun-ĉi timindan demandon dum nia prelego.

Sed antaŭ ol kompari la du tradukojn, mi ŝatus fari kelkajn ĝeneralajn komentojn pri la originala poemo. Temas, kiel la titolo indikas, pri la travivaĵoj de monaĥino, kiu devenas el la cigana popolo, kiu estas tre multnombra en Andaluzio, la suda parto de Hispanio, t.e. la regiono en kiu naskiĝis la aŭtoro de la poemo, Federico García Lorca. La elekto de tiu-ĉi virino entenas grandan kontraston, inter la libereco de la ciganoj kaj la mallibereco de la monaĥoj, kvankam oni povas supozi ke temas pri memvola elekto. Ni vidos, ke tiu-ĉi kontrasto ludas gravan rolon en la interpretado de la poemo.





Antaŭ la prezentado de la monaĥino en la tria verso, la du unuaj versoj priskribas la etoson de la monaĥejo, sed en la ekstera parto: ĉio silentas en la naturo, kiu prezentas sin per la minerala mondo (cal-kalk'-kalka) kaj per la vegetala (mirto – malvoj – herboj fajnaj – herbaj tigoj). La monaĥino brodas ene de la monaĥejo, oni do povas supozi ke ŝi estas en sia ĉelo, ĉar oni mencias la "lustro"-n aŭ "kandelabro"-n. Sed kion ŝi brodas? Florojn, precize "keirantoj"-n, kiel ĝuste tradukas la A tradukisto, dum la B tradukisto elektas alian floron, la "rozon".

Kompreneble, ne estas eraro, sed rezulto de la tradukelekto: ni ne forgesu ke la B tradukisto decidis verki la saman kvanton da versoj, kiel en la originalo! La nomo de la "lustro" aŭ "kandelabro" estas en la hispana "araña", t.e. araneo en e-o; la "sep birdoj", kiuj flugas ĉirkaŭ la "lustro" ne estas veraj birdoj, kompreneble. Temas pri metaforo de la sep koloroj de la ĉielarko, kies spegurbildo estas videbla dank' al la lumo de la suno kiu eniras la ĉelon. Tamen, ni ne povas tute nuligi alian hipotezon, t.e. la ebleco de aludo al la reala birdo nomata en la hispana "sietecolores", t.e. la kardelo. Ĝis nun, ni povas rimarki plurajn kontrastojn: inter la libereco (la cigana mondo) kaj la mallibereco (la monaĥejo), la ekstera mondo (ĝardeno) kaj la interna (ĉelo). Tamen, estas alia kontrasto, pli subtila, inter la mondo de la reala naturo (minerala kaj vegetala) kaj tiu de la artefarita naturo: la floroj, kiujn la monaĥino brodas, kaj la metafora uzado de nomoj de naturaj estaĵoj – araneo, birdoj, kiuj enmetas alian parton de la naturo: la animalan regnon. Tiun-ĉi regnon de la naturo trovas ni en la sekvantaj versoj, kie la poeto komparas la preĝejon kun la urso (sur dorso-staro A – sur la spino B). La sovaĝa besto, plie, "grumbas", indikante per tiu metaforo, verŝajne, la sonorilon de la preĝejo. La animala metaforo nun atingas ankaŭ la eksteran mondon, ne nur tiun de la ĉelo, kaj montras tre negativan signifon, timinda kiel urso. Temas pri animaligado de sankta konstruaĵo, t. e. la preĝejo: ĉu sakrilegia komparado? Fakte, la sekvantaj versoj ŝajnas konfirmi tiun-ĉi kontraston: ni revenas en la ĉelon, kaj la poeto ĝojas pri la beleco de la monaĥina brodado. Nun, ŝi aldonas aliajn florojn, laŭ sia fantazio: sunofloron, magnoliojn, safranojn. La vegetala regno multnombriĝas, sed pli kaj pli fariĝas artefarita naturo, kiu eĉ devenas el la monaĥina fantazio. Ni povas rimarki, ankoraŭfoje, ke la tradukisto B anstataŭigas "lunas" per "steloj": en tiu kazo, ŝajnas al mi pli malfacile pravigi tiun-ĉi elekton, ĉar ne temas pri rinvorto; plie "lunoj" enhavas la saman kvanton da silaboj, kiel "steloj" (du).

Aliflanke, mi opinias ke la vorto “lunoj” ludas gravan rolon, ĉar ĝi respegulas la “suno”-n de la “sunofloro”: tiel, en tiuj versoj ĉeestas la ĉiutaga ciklo de la tero, ekde la sunleviĝo ĝis la sunsubiro kaj poste la lunleviĝo. Per aliaj vortoj, la brodado de la monaĥino enhavas grandan kosman harmonion, sed ĝi estas artefarita harmonio, kiun ŝi estas devigata, nostalgie, rekonstrui per sia brodado. Indas rimarki ke la floroj, kiujn ŝi brodas, estas bonodoraj kaj buntaj: keirantoj, magnolio, safrano, sunofloro. Plie, la safranoflorojn oni uzas en la hispana kuirarto, kaj ne nur en la hispana, kompreneble. Do, oni povas aldoni alian sentumon: la gusto. Sed, precize tiujn tri sentumojn ne povas ŝi atingi, ĉar ili nur ekzistas en la artefarita mondo, ne en la reala. Sed la du sekvantaj versoj enhavas verajn manĝaĵojn: kvin “citronoj” (tiel la du tradukistoj: tamen, estus pli ekzakte traduki “toronjas” per “pampelmuso”, sed kompreneble, tiu ĉi vorto estas kvarsilaba). Do, finfine jen la realo: nia monaĥino tuj gustumos la dolĉajn fruktojn! Sed, kiamaniere la poeto prezentas ilin? Per alia metaforo: la fruktoj estas “la kvin vundoj de Jesuo”. La anstataŭigo de “Cristo” per “Jesuo” estas tute komprenebla pro metrikaj kialoj. Tamen la komparado malbonigas la fruktojn, ĉar ili fariĝas “vundoj”, do ilia suko devus esti la sango mem de Jesuo! Plie: en la originala teksto oni diras, ke la kvin vundoj estis tranĉitaj en la regiono de Almeria, en Andaluzio. Sed neniu el la du tradukistoj zorgas pri tiu ĉi verbo, dirante tutsimple: “El la Almeria kampo” (A) – El kampar’ de Almerio” (B). Tamen, la participo “cortadas” (tranĉitaj) enmetas signifon de perforto, kaj samtempe estas iom ambigua: ĉu ĝi rilatas al la kvin vundoj aŭ al la fruktoj? La perforto de la naturo (tranĉi la fruktojn de la arbo) egalas al la perforto, kiun oni faris al Jesuo, dum lia Pasiono, kiam oni krucumis lin per la kvar najloj en la manoj kaj piedoj. La romiana soldato plie, per sia lanco, vundis lin en la flanko. Notinde ke la scienca nomo de la frukto (“toronja”) estas, en la latina: “citrus paradisi”, t.e. la citrono de la paradizo.



de perforto, kaj samtempe estas iom ambigua: ĉu ĝi rilatas al la kvin vundoj aŭ al la fruktoj? La perforto de la naturo (tranĉi la fruktojn de la arbo) egalas al la perforto, kiun oni faris al Jesuo, dum lia Pasiono, kiam oni krucumis lin per la kvar najloj en la manoj kaj piedoj. La romiana soldato plie, per sia lanco, vundis lin en la flanko. Notinde ke la scienca nomo de la frukto (“toronja”) estas, en la latina: “citrus paradisi”, t.e. la citrono de la paradizo.

Ni revenas internen, apud la monaĥino, en kies okuloj “galopadas / tragalopas du rajdistoj”. Fakte, nun ni eniras la animon de la virino, ni malkovras ŝiajn revojn, eble ŝiajn amrevojn. Kiuj estas tiuj rajdistoj? Ĉu ili vere ekzistas, aŭ ĉu ili nur estas memoraĵoj de la estinteco, de la juneco eble, de la monaĥino? Ŝajnas, ke la dua interpretado estas preferinda: oni dirus, ke ŝi estas atendanta ilin, kvankam ili estas nur en ŝiaj okuloj. Subite ŝi aŭdas “rumoro-n... surda-n” (A), kiu “de ŝi levas la ĉemizon (B) / la korsajon (A)”: en la originala teksto oni trovas la verbon “despega”,

t.e. “malgluas”, kvazaŭ la ĉemizo (t.e. la religia robo, kiu kaŝas ŝian virinecon) estus “gluita” sur ŝia korpo. Alivorte, ŝi sin preparas je la amrenkontiĝo kun la rajdistoj, oni povas supozi, ĉar ŝi tuj sin senvestigas. Sed ŝi rigardas tra la fenestro de la ĉelo, sed vidas nenion “en la kruta(n) malproksimo(n)”. Pro tio, ŝia koro rompiĝas, sendube pro la doloro de la foresto, kiu faras ankoraŭ pli malfacile eltenebla la solecon de la ĉelo kaj de la vivo en monaĥejo. Notinde ke ŝia koro estas “el suker’ kaj glicirizo” (B) / “kaj herb-balzamo” (A): tio memorigas nin la dolĉaĵojn de la kvin citronoj, kiuj estis maldolĉigitaj per la komparado kun la kvin vundoj de Jesuo. Nun ni vidas, ke la koro de la monaĥino estas dolĉa, do temas nun pri pozitiva metaforo rilate al ŝia karaktero, al ŝia animo: ŝi estas dolĉa virino, tre sentema, kies koro rompiĝas pro la nostalgio de la pasinteco kaj amo, kiuj ne plu estas atingeblaj. Ankoraŭfoje, la vegetala regno de la naturo havas nur metaforan signifon por la monaĥino: la bonodoraj herboj (“glicirizo” aŭ “herb-balzamo”, fakte speco de verbeno) kaj la sukero ne estas realaj por ŝi, estas nur vortoj. La kvar sekvantaj versoj priskribas neeblajn realaĵojn: “ebenaĵ’ en klino” (B) (la A tradukisto ne tradukas tion), kaj “riveregojn starajn” (B) / “kiom staraj la riveroj” (A). Fakte, temas pri figuro de la klasika poezio, t. n. en la greka “adynaton”, kaj en la latina “res impossibilia”, per kiu oni esprimas la neeblecon per situacioj kiuj kontraŭdiras la fizikajn regulojn de la naturo. Ni trovas tiun ĉi stilfiguron ankaŭ en la Malnova Testamento, en la libro de Jesaja (ĉap. 11, v. 6-8), tiel tradukita de Ludoviko Zamenhof: “Kaj loĝos lupoj kun ŝafido, kaj leopardo kuŝos kun kaprido; kaj bovido kaj leonado kaj grasigita bruto estos kune, kaj malgranda knabo ilin kondukos. Kaj bovino paŝtiĝos kun urso, kaj iliaj idoj kuŝos kune; kaj leono simile al bovo manĝos pajlon. Kaj suĉinfano ludos super la truo de aspido, kaj demamigita infano metos sian manon sur la neston de vipuro”.



En nia poemo, oni povas pensi pri la neebla renkontiĝo inter la monaĥino kaj la du imagitaj rajdistoj. Tio esprimas la seksan frustron de la virino, kiu estas devigata trapasi sian tutan vivon en la monaĥejo, kvazaŭ ŝi estus kaptita en senfina malliberejo. Ŝi devas rezigni pri amo, kaj vivo ekster la monaĥejo: pro tio ŝi daŭrigas sian laboron, la brodadon de la artefaritaj floroj en sia ĉelo. La poemo finiĝas per la plej elvidebla aludo al malliberejo: fakte, “la taglumo”, kiu “ŝakon ludas / alte tra la ĵaluzio” (A / B) estas vida bildo de la fenestreto de la ĉelo, kun la stangetoj, kiel en la malliberejoj. Pro tio “la taglumo ŝakon ludas”: estas la respegulo de la krado de la fenestreto sur la planko de la ĉelo. Plie, la “taglumo” iĝas homa, ĉar ĝi



“staras” (A) “piede en la brizo” (B). Tio insistas, reciproke, pri la nehoma kondiĉo de la virino. Estas ankaŭ tre signifa, miaopinie, ke tie, ĝuste en la fino de la poemo, aperas du elvideblaj metaforoj de la konceptado de la dieco en la okcidenta religia tradicio: la lumo kaj la brizo. Ĉefe en la jud-kristana tradicio, Dio estas lumo, kaj Li prezentas sin al la homaro per la aero: vento, ŝtormo, aŭ brizo. Tio okazis en la fama epizodo de la profeto Elijo, en la Malnova Testamento, kiun Zamenhof tradukis tiel: “blovado de delikata venteto” (Unua Libro de la Reĝoj, ĉapitro 19, versiklo 12). Tutevidente, laŭ la kristanoj, tiu ĉi “venteto” antaŭfiguras la Sanktan Spiriton, unu el la tri personoj de la Sankta Triunuo. Sed, por la cigana monaĥino, la brizo kaj la lumo situas

ekstere, en la ĝardeno de la monaĥejo, same kiel la mirto, la malvoj kaj la herboj, kiuj aperas komence de la poemo. Fakte, tiu bela, milda ĝardeno estas bildo de la paradizo, kiel oni vidas en la mezepoka pentraĵo, kaj en literaturo nomiĝas “locus amoenus”. Tia ejo kutime entenas harmonie la kvar elementojn (aero, akvo, tero, fajro) kun la kvin sentumojn (vidado, flarsento, gustumado, aŭdado, tuŝosento). En tiu ĉi poemo, ni konstatas ke la kvar elementoj ĉeestas, sed ne koncernas la monaĥinon, aŭ nur nerekte: ni ĵus vidis la kazon de la aero; fakte, en la ĉelo de la monaĥino oni aludas pri la aero, per la sep birdoj, sed ni vidis, ke temas pri metaforaj birdoj, ne realaj; la akvo nur ĉeestas en la fantazio de la monaĥino, kiam ŝi revas pri la neeblaj “riveregoj(n) staraj(n)”, sed la realo estas tute malsama: la sekeco de la “krutaj montoj A / kruta(n) malproksimo(n) B”; la fajron kutime simbolas la suno: en tiu kazo, ni vidas, ke la monaĥino revas pri “dudek-suna” lumo, sed en la realo ŝi brodas artefaritajn “sunoflorojn”. La tero estas fruktodona, ĝi produktas florojn, kreskaĵojn kaj fruktojn (mirto, malvoj, fajnaj herboj, keirantoj, kvin citronoj) sed la monaĥino nur vidas “krutan malproksimon / montojn”. Tio signifas, ankoraŭfoje, ke la fekundeco de la naturo ne koncernas ŝin; male, ŝi estas, pro sia situacio, devigata al malfekundeco. Temas pri unu el la plej konstantaj temoj de la verko de Garcia Lorca, ĉefe en lia tragedio “Yerma” (t.e. “malfekunda, sterila”) de 1933. La kvin sentumojn ni povas analizi per la sama maniero: ili ja ĉeestas en la poemo, sed ne koncernas la monaĥinon, escepte de la vidado kaj la tuŝosento, ĉar ŝi brodas florojn, sed temas pri devigaj sentumoj, kiujn ŝi bezonas por fari sian laboron. Sed ŝi ne profitas de ili, nek de la aliaj sentumoj: la herboj, floroj kaj fruktoj troviĝas ekstere, en la ĝardeno aŭ en malproksimeco: ne estas tute hazarde, miaopinie, ke la bonodoraj floroj, kiel la keirantoj, estas tiuj, kiujn ŝi brodas, do la bonodoro estas nuligita, same kiel la birdokantoj, kiuj nur metafore ĉeestas, kvankam ili “flugas”. La ĝojo de tiuj kantoj estas do nuligita. En la monaĥejo regas nur

“silento” (estas la unua vorto de la poemo): tion oni povas interpreti kiel tute normala situacio en tiu loko, sed estas strange ke la preĝejon oni priskribas per tute malagrabra sonora metaforo: grumblado de urso. Plie, la “rumoro lasta surda”, kiun ŝi aŭdas, estas verŝajne reala sono, sed ŝi interpretas ĝin laŭ sia fantazio, kiel la alveno de la rajdistoj: pro tio ŝi subite “levas de ŝi la ĉemizon (B) / korsaĵon (A)”, sed vane. Same pri la gustumado: ĉu la monaĥino gustumas la kvin dolĉajn citronojn aŭ ne? Miaopinie, ne, ĉar ili respegulas la kvin vundojn de Jesuo, kaj ili estis “tranĉitaj” (ne “plukitaj”) de la arboj, kiel ni jam klarigis antaŭe. Pri la tuŝosento, oni povas rimarki, same kiel pri vidado, ke ŝi ja bezonas ĝin por fari sian brodadon: sed ŝi ne ĝojas pri la tuŝosento. Fakte, ŝi brodas sur “pajleska lino” (B) / “ŝtofo flava” (A), do tute ne agrabra tuko. La B traduko pravas per “pajleska”, sed la aldono de “lino” tro mildigas la tuŝosenton. La A traduko estas tro neŭtrala, miaopinie. Plie, laŭ mi, la traduko de “pajza” per “flava” nuligas precize la humilecon de la tuko, kaj ĝian malagrablan tuŝosenton. Eble oni povas trovi alian aludon al tuŝosento en la originala versio, per la verbo “despega” (24): kiel ni jam diris, la litera traduko estus “malgluas”, sed la du tradukistoj preferis uzi la verbon “levi”, pli neŭtralan. Ni povas kompreni tiun elekton pro metrikaj kialoj (malglui estas trisilaba vorto), sed temas pri grava verbo, ĉar ĝi emfazas la malagrablan kontakton de la religia robo (sed tie nomata per la nereligia vorto: ĉemizo) kun la korpo de la monaĥino, kvazaŭ ĝi estus metaforo de la vivo de la virino, kiu estus “gluita” al monaĥejo.



La konkludoj de nia persona analizo kaj interpretado koncernas kaj la poemon, kaj la du tradukojn. Pri la tradukoj, ni povas konstati ke tradukisto A, foje, proponas pli precizajn vortojn ol tradukisto B. Sed, ni devas samtempe konscii, ke la tradukelekto de B, t.e. konservi la saman kvanton da versoj kiel la originala poemo (tio, kion li faras ankaŭ en la aliaj poemoj de la tuta verkaro), devigas lin, kelkfoje, malproksimiĝi de la originala teksto. Male, foje la A tradukisto povas eltrovi pli precizajn solvojn, ĉar li faris alian tradukelekton, eble pli facilan: li rezignis alkonformigi sian tradukon al la sama kvanto da versoj, kiel en la originala poemo.



Do, memkompreneble, li povas aldoni pli da detaloj, ekzemple uzi du versojn por esprimi la enhavon de unu verso de la originala teksto. Entute, li aldonas kvar versojn. Du tradukmetodoj: pli rigora pri ritmo kaj muziko (la B), pli respektema pri la signifoj kaj bildoj (la A). Sed ambaŭ, laŭ mi, tute elstaraj tradukoj!

Pri la interpretado de la poemo, mi citos la vortojn de la poeto mem, el alia verko, *Impresiones y paisajes (Impresoj kaj pejzaĝoj)*, lia unua libro, eldonita en 1918. Temas pri prozaj vojaĝskizoj, kion tutklare montras la titolo. Tie, ni legas tiujn ĉi frazojn pri la religia vivo de la monaĥinoj: “Verdire, preskaŭ ĉiam, tio, kio instigas tiajn sanktajn virinojn sin enfermi en tiaj mortaj solenaĵoj estas senta konflikto, kiun ili ne povis elteni per siaj malfortaj animoj... Temas pri rompitaĵoj de amo kaj patrineco... Monaĥejo estas kiel grandega malvarma koro, kiu gardos en sia sino la animojn de tiuj, kiuj fuĝis el la ĉefpekoj”. (persona traduko). Ŝajnas al ni, ke tiu ĉi malgaja kaj malhela priskribo de la monaĥina vivo pravigas nian interpretaĵon de la poemo. Plie, se ni aldonas la fakton, ke nia monaĥino estas ankaŭ ciganino, oni povas diri ke ŝi suferas duoble: pro la am- kaj seksfrustro, pro la rezigno fariĝi patrino, kaj samtempe pro la granda kontrasto inter la vivmaniero de sia popolo, la ciganoj, kaj la enfermo en la monaĥejo dum sia tuta vivo.

*Elvezio*



## LA PRINTEMPO DE L' POETOJ

**O**kaze de la cenona kunveno la 21an de marto, ĉiu partoprenanto legis poemon, kiun li/ŝi elektis.

Ĝuu la jenan bukedon!

Poemoj elektitaj de Bernard kaj Rose:

### Maraj skizoj

Flugas mevoj super maro  
Blankaj, blankaj mevoj.  
Post ilia ĝoja aro  
Flugas miaj revoj.

Blankaj mevoj flugas alte,  
Alte super ondo,  
Kaj senlace, kaj senhalte  
Al mirinda mondo  
Flugas miaj revoj,  
Kiel blankaj mevoj.

### Georgo Deŝkin



Poemo elektita de Marcelo

London' brulas,  
London' brulas,  
Rigardu, rigardu  
Fajr'! Fajr'! Fajr'! Fajr'!  
Alportu ni akvon!

Popola kanto tradukita de  
**William Auld**



### Dumnokta aviado

Silent' – krom nur mallaŭta zumo,  
kiu l' orelojn ne molestas.

Obskur' – krom ke fantoma lumo  
en la kajuto fosforeskas.

Senmovaj ŝvebas tuŝ-proksime  
la astroj, kiel mil lampiroj.

En nova mondo mi pilgrime  
flugas en voj' de l' pioniroj...

### William Auld



*La Granda Incendio, 1666, anonimulo*

Poemo verkita de Martine:

### Poemeto por vi

Mi ne estas vera poetino  
sed mi ŝatus esprimi min pri io.  
Kiam mi estis junulino - longe antaŭe  
mi aŭdis pri Esperanto  
kaj mi opiniis: jen granda novaĵo.  
Sed mi atendis esti en Bordoza  
por serĉi kurson per komputilo.  
Mi trovis grupon en Cenon - kun ĝojo.  
Ĉi tie mi ŝatas, post varma akcepto,  
efikan instruon dank'al sperteco,  
malavareco kaj amikeco.  
Plie estas same kun nia pli larĝa grupo,  
kie ĉiam estas varmeco kaj bonkora interŝanĝo  
- sen forgesi pri abunda manĝaĵo.  
Do, pro tio, mi volas diri al vi ĉiujn hodiaŭ

DANKON

Kun multe da sincereco.



Poemo elektita de Jean-Seb:

### Sciuro kaj papago

Sciuro malgranda kuradis en rado  
Kaj homojn amuzis per sia kurado.  
Kaj jen al papago ĝi diris fiere:  
«Mi vin, mizerulo, bedaŭras sincere:  
Kun kora doloro eterne mi vidas,  
Ke tute senmove sur ringo vi sidas!  
Rigardu: jen ĉiam mi kuras pli alte  
Kaj tial je vivo kontentas senhalte ...»  
Papago rigardis sciuron kun moko  
Kaj diris: «kurado rapida kaj lerta,  
Sed bone kurante, sur unu nur loko  
Vi restas, mizera besteto nesperta.»

Vasilij Devjatnin



Poemo elektita de Elvezio:

### **La blinda bovino**

Senvole per la kap' ektuŝegante  
je unu kaj alia trunk', sencele,  
iradas sur voj' al trinkoloko  
bovino, kiu venas tute sola.  
Ŝi blinda estas. Paŝtistet' per frapo  
de ŝton' al ŝi tro lerte surĵetita  
okulon unu ŝian difektigis,  
l' alian membraneto nubekovras:  
jen blinda estas la bovin'. Ŝi venas  
al font' por trinki, kiel ŝi kutimis;  
sed ne kun firma la sinten' tiama,  
ne kun kolegoj siaj, ne, tutsola  
alpaŝas ŝi. Fratinoj ŝiaj dume  
ĉe krutegrokoj, sur plataltaĵoj,  
en la silent' herbeja, ĉe l' akvbordoj,  
sonigas pendtintilon, freŝan herbon  
manĝante laŭ plezuro... Ŝi jam falus...  
L' akvuĵon akrerandan ektuŝegas  
ŝi per la buŝ' kaj honte sin retiras.  
Sed ŝi revenas, sian kapon metas  
en l' akvon kaj eltrinkas malrapide.  
Ŝi trinkas sen soifo, nur malmulte.  
Kun granda tragedia gesto, poste  
ŝi levas al ĉiel', egan, la kapon  
kornhavan: sur senvivaj la pupiloj  
ŝi palpebrumas kaj denove venas,  
je lumo orfa sub brulanta suno,  
malferme sur la voj' neforgesebla,  
malvigle balancante la longvoston.

**Joan Maragall**



### Estas mi esperantisto

Verda stelo sur la brusto  
Iom palas pro la rusto.  
Mi ne estas purigisto  
Estas mi esperantisto.



Gramatikon mi ne konas  
Kaj gazetojn ne abonas.  
Librojn legu la verkisto,  
Estas mi esperantisto.

Mi parolas kun rapido:  
“Bonan tagon, ĝis revido”  
Ĝi sufiĉas por ekzisto,  
Estas mi esperantisto.

Por la venko mi esperas,  
Sed nenion mi oferas,  
Mi ne estas ja bankisto,  
Estas mi esperantisto.

Se baraktas en la krizo  
La movado, organizo  
Helpas mi nur per rezisto,  
Estas mi esperantisto.

Post la mort’ ĉe tombo mia  
Staros “rondo familia”.  
Nekrologos ĵurnalisto:  
“Estis li esperantisto”.

### Julio Baghy



### La tragedia vojaĝo de bankizero

Kien fordrivas vi, glacimonto?  
Grumblas la blanka urso.  
Mi ekvojaĝas al horizonto,  
Logas min la ekskurso.  
Kune ni flosu laŭ Labradoro,  
Foko petole ridas.  
Bona ideo! Ĝis ekvatoro  
Fluo ekde nun gvidas...

Kien fordrivas vi, glacipeco?  
Miras la flama Damo.  
Mi en honor’ al vi, Libereco,  
Iras al varma amo.  
Zorge atentu vi, ĉar en sudo  
Vi elreviĝon riskas.  
Ŝvitas mi jam sub ĉi latitudo,  
Ne plu sufiĉe friskas.

Kien fordrivas vi, glaciero?  
Ruktas petrol-fluido?  
Al blua revo sed jen en vero  
Nigras mar’ en Florido.  
Ja! mi voremas malprudentulojn,  
Birdojn, balenojn, fiŝojn...  
Ve! mi ne vidos la sorĉinsulojn,  
Perdis mi vivfeliĉojn.

(Muziko)

Homoj! gravegas situacio:  
Ĝemas surtera vivo  
Baldaŭ fandiĝos lasta glacio  
Kiel do faros ni por  
Kiel do faros ni por  
Mia aperitivo?

**Dialogoj de Marcelo Redulez**  
*L’Hortie, la 18an de majo 2011*



## **STAĜO ESPERANTO kaj BOTANIKO en la muelejo de PIOT (dep. Creuse)**

**SABATON, la 15an kaj DIMANĈON 16an de  
JUNO 2019**

**STAĜOKOSTO, ĉioninkluzive : 50 €**

**Akcepto vendredon vespere ekde la 18h kaj dimanĉe  
matene ekde la 9h**


### **PROGRAMO:**


- vendredon vespere : akcepto kaj historio de la muelejo e Piot
- sabaton :
  - o matene de la 10h ĝis tagmezo
  - o posttagmeze de la 14h ĝis la 17h
  - o vespere kun Marcelo REDULEZ
- dimanĉon :
  - o matene de la 10h ĝis tagmezo
  - o posttagmeze komuna botanikista promenado

### **KURSOJ:**

- Kurso kun komencantoj kun Gilles TABARD
- Konversacio kun Clair MAHE
- Gramatikumado kun Christian DOUCELIN et Christian LAVARENNE
- Botaniko kun Marie-Hélène FROGER kaj Isabelle JACOB

Eblas elekti diversajn kursojn je ĉiu duontago.





## ALIGILO :

Famila kaj persona nomoj:

Adreso :

Téléfononumero kaj retadreso:

Mi alvenos la ..... je la  
.....h.....

Mi forveturos la ..... je la  
.....h.....

Aliĝilo resendenda al Isabelle JACOB : [isabellejacob@laposte.net](mailto:isabellejacob@laposte.net)  
aŭ Pomarbo 1 route de Florensac 87200 SAINT-BRICE T : 05 55 03  
54 76

## VINILKOSMO SOJLE DE FERMO

En 2018 ni konstatis gravan malkreskon de la intereso al la Esperanto-muziko kun gravaj konsekvencoj: ege malmultaj diskovendoj kaj ege malmultaj elŝutvendoj. Iom kreskis la elsendflua aŭskultado, sed tre bedaŭrinde ĝi ne sufiĉe pagas por vivteni la eldonejon, kaj tio baras tutan eblan perspektivon...

Pro tio estis kreita la Abonklubo, kiun ni vidis kiel alternativon helpe de la justa elsendfluejo (Divercities Music) por daŭrigi la muzikproduktadon kaj eldonadon. Sed tre bedaŭrinde post tri jaroj da ekzisto ni devas konstati, ke ankaŭ la Abonklubo malsukcesas. Videble homoj preferas daŭre aŭskulti muzikon senpage en aliaj retejoj (Deezer, Youtube aŭ Spotify).

Vinilkosmo provos elteni ankoraŭ unu plian jaron, sed se en 2019 ne inverŝiĝos la situacio kaj ne multobliĝos la abonantaro de la Abonklubo kaj la uzantaro de Divercities Music, Vinilkosmo devos esti fermita.

Konsekvencoj de la fermo de Vinilkosmo estos jenaj:

1. Tuj malaperos la katalogo de Vinilkosmo en la reto (nia propra muzika platformo, sed ankaŭ en Divercities Music kaj en ĉiuj aliaj muzikaj platformoj, kie nun estas disponebla la katalogo). Tio signifas ke en Deezer, Spotify ktp, oni ne plu povos aŭskulti muzikon de la Vinilkosmo-katalogo.

2. Malaperos la ebleco de regula muzikproduktado, eldonado de novaj albumoj kaj reeldonado de malnovaj albumoj.

Kiel eviti fermon de Vinilkosmo?

Esperantistoj devas konscii, ke ne eblas uzi kaj aŭskulti Esperanto-muzikon sen subteni ĝin, aktive kontribuante, por ke ĝi pluvivu. Do konklude kaj praktike, la nura alternativo eviti fermon de Vinilkosmo estas, ke ĉiuj, kiuj volas daŭre povi aŭskulti Esperanto-muzikon el la katalogo de Vinilkosmo, aliĝu al la Abonklubo (eĉ se ili ne uzas la justan elsendfluejon Divercities Music) kun la celo multobligi la nombron de la abonantoj:

<https://www.vinilkosmo-mp3.com/eo/vinilkosmo-abonklubo/abonoj-abonklubo.html>

Se tio ne okazos, en 2020 tute malaperos la muzika katalogo de Vinilkosmo el la interreta pejzaĝo.

Dankon pro via atento kaj via subteno!

**La tuta teamo de Vinilkosmo**





## EL LA FLORARO DE MARCELO...

*Glechoma hederacea*  
Lierre terrestre  
Lamiacoj



10-40cm  
avr-jun - plurjara

### Grundohedero

Grundohedero ofte pioniras sur nudaj grundoj per foren rampantaj tigoj.

Iamaj Ĝermanoj ĝin taksis medicina, magia planto. Kun amara, forta, eĉ irita gusto, ĝi plu estas uzata kontraŭ lakso, tuso kaj haŭtafekcioj. Eblas ankaŭ aldoni iom da ĝi por salatoj aŭ kazeo, aŭ kuiru foliojn kiel spinacojn.



8

*Glechoma hederacea*  
Lierre terrestre  
Lamiacoj



10-40cm  
avr-jun - plurjara

### Grundohedero

Grundohedero estis uzita eĉ en bierreceptoj anstataŭ lupolo. Sed fama dekreto *Reinheitstgebot* en 1516 de bavara Vilhelmo la 4a pri « pureco de biero » absolute malpermesis pluan uzadon.

Laŭdire ĝi estus toksa por ĉevaloj, kiuj tro grandkvante ĝin englutus.



9





## Kie oni vidas, kiel Izengreno deziris konvertiĝi kaj kiel li estis ordinata monaĥo de la abatejo de Tyron

**A**lproksimiĝu, kara onklo, prenu; niaj Fratoj donacas tion al vi esperante ke vi baldaŭ sidos inter ni.

- Tion mi pripensos. Povus esti. Sed, per Dio, donu do.

- Jen! Nu kiel plaĉas al vi?

- Ja tio estas la plej bongusta manĝaĵo en la mondo. Kia gusto, kia saporo! Mi sentas min jam proksima al konvertiĝo. Vi povus doni al mi duan peceton, ĉu ne?

- Hoho! Se vi volas fariĝi monaĥo, vi baldaŭ estos mia superulo; ĉar mi ne dubas, antaŭ Pentekosto niaj Fratoj interkonsentos elekti vin abato.

- Ĉu eblus? Ho ne, vi ŝercas.

- Sincere ne! Je mia kapo! Vi estus la plej pompa monaĥo en la mondo, kaj post kiam vi surmetos nigrajn drapojn sur vian grizan felon...

- Ĉu tiam vi donos al mi tiom da fiŝaĵoj, kiom mi deziros?

- Tiom, kiom vi deziros.

- Tio decidigas min. Tuj tondigu min.

- Ne nur tondi, sed ankaŭ tonsuri.

- Ĉu tonsuri? Mi ne kredis, ke tion oni postulas. Do vi tonsuru min.



- Necesas atendi, ke la akvo varmetiĝu; despli bela estos la harkrono. Ek, ĝi estas kvazaŭ preta, nek tro malvarma, nek bolanta. Simple iel kliniĝu kaj pasigu la kapon tra la aperturo, kiun mi nun malfermas.

Yzengreno agas kiel postulate; li streĉas la spinon, antaŭenŝovas la kapon, kaj Renardo tuj renversas la poton kaj surverŝas lin per bolanta akvo.

- Ve! ekkrias kompatinda Yzengreno. Mi pereas! mi mortas! Aĥ, al Diablo la tonsuro. Vi ĝin faras tro granda.

Renardo, kaŝridante:

- Ne, kunulo, tia oni ĝin portas; ĝi apenaŭ laŭregule larĝas.

- Ne eblas.

- Tion mi konfirmas kaj eĉ aldiras, ke monaĥeja regulo postulas, ke vi ekstere trapasu la unuan nokton pie kaj preĝante.

- Se mi ĉion ĉi scius kaj aparte, kiel oni tonsuras monaĥojn, mi ne dezirus monaĥiĝi aŭ la diablo forportu min. Sed estas tro malfrue por repreni mian vorton. Ĉu oni almenaŭ donos al mi angilojn?

- La tago baldaŭ finiĝos, diras Renardo. Cetere mi tuj renkontiĝos kun vi, por ke ĝi ŝajnu al vi malpli longa.

Tion dirinte li eliris tra sekreta pordo nur de li konata, kaj alvenis apud Yzengreno. Parolante pri la dolĉa kaj edifa vivo de la monaĥoj li kondukis la novkonvertiton randen de fiŝbaseno kie okazis aventuro, kiun ni tuj rakontos al vi.

FINO



## NIAJ KURSOJ

- A **GUJAN-MESTRAS**, le jeudi de 10h à midi, cours pour débutants, au local attenant au bureau de poste de la Hume, salle de formation, 43 avenue du Maréchal de Lattre de Tassigny 33470 Gujan-Mestras. (06 95 02 85 00)

- A **CREON**, le lundi 15h30 à 16h45 (TAP), Morine STRIDE (06 10 07 08 58)

- En **GALGON**, ĉiun vendredon de la 17a ĝis la 19a, Joël LAJUS gvidas kurson por komencantoj kaj progresantoj. (05 57 69 26 96)

- En **CENON** (Kastelo Palmer), ĉiun lundon inter la 14a kaj la 17a, Marcelo REDOULEZ animas tradukgrupon. (05 56 21 38 64)

- En **MONTENDRE**, ĉiun mardon de la 10a ĝis la 12a, Janine DUMOULIN gvidas kurson por ĉiuj niveloj. (05 46 49 45 18)

- En **UNIVERSITATO BORDEAUX MONTAIGNE**, en salono D-009, ĉiun merkredon de la 17a30 ĝis la 19a, kursojn gvidas Elvezio helpe de Jean-Seb. (06 72 17 22 97)

**ESTRARO**  
**de**  
**«ESPÉRANTO-GIRONDE»**

\* \* \* \* \*

**Centre Culturel Château Palmer**  
**33150 CENON**

\* \* \* \* \*

Prezidanto: **Elvezio CANONICA**  
Université de Bordeaux Montaigne  
UFR Langues,

Domaine Universitaire, Esplanade des Antilles,  
33600 Pessac

Tel: 06 72 17 22 97 / [canonica.elvezio@orange.fr](mailto:canonica.elvezio@orange.fr)

Sekretariino: **Janine DUMOULIN**

2, chemin des Nauves

Chardes 17130 MONTENDRE

Tel: 05 46 49 45 18 / [janinedum@neuf.fr](mailto:janinedum@neuf.fr)

Kasistino: **Martine EDELBOUDE**

2 rue Raymond Lavigne

33100 BORDEAUX

Tel: 06 73 34 81 88 / [mabel1533@laposte.net](mailto:mabel1533@laposte.net)

\* \* \* \* \*

**Materialon por LEGI bv. sendi al [janinedum@neuf.fr](mailto:janinedum@neuf.fr)  
aŭ al [esperanto.gironde@free.fr](mailto:esperanto.gironde@free.fr)**

**La venonta kunveno okazos la 12an de majo ĉe Monique, por festi  
ŝian 80an datrevenon! (vd adreson p.8)**

